



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRÁSÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

Nº 25

MAIO DE 1977

BOLETIM INFORMATIVO

Redação: — Maria Almada

ELEIÇÕES NO CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Nos últimos boletins nós vimos solicitando aos srs. presidentes das sociedades componentes do Conselho Brasileiro de Esperanto que se manifestem relativamente à eleição de nova diretoria ou reeleição da atual, consoante circular enviada ultimamente. Contudo poucos se manifestaram até o momento. Não gostaríamos de permanecer em nossos postos sem a manifestação expressa dos responsáveis pela nossa eleição. Toda sociedade tem seu mandato definido e deve ser respeitado, inclusive não deve permanecer alheia aos seus estatutos, que são a lei pela qual se rege. Assim sendo, insistimos: devolvam as circulares

distribuídas, indicando uma chapa para substituir a atual diretoria ou declare sinceramente que aprova a reeleição da atual que então terá novo mandato até 8/6/1980. Agradecidos.

GAZETOJ RICEVITAJ — Ni ricevis kaj dankas la jenajn gazetojn el:

JAGUARÃO (RS) — “A Folha” — Kiu raportas pri la ekskurso de studentoj kaj esperantistoj de la urboj Pôrto Alegre, Pelotas, Bagé kaj Jaguarão, ĉiuj el Rio Grande do Sul, farita al urbo Rio Grande (RS), en la 30-a de aprilo pasinta. La raporto elstarigas la grandan sukceson de tiu ekskurso, kiu ebligis la alproksimiĝon de pluraj elementoj al esperanto-movado. Afable sendis al ni la gazeton s-ro Mario Portinari, al kiu ni kore dankas pro la ĝentileco.

S. BERNARDO DO CAMPO (SP) — "Correio Fraternal do A.B.C." kun vastaj raportoj pri spiritismo kaj aktualaĵoj.

ILHEUS (BA) — "Ilheus Jornal" kiu aperigas tre gravan artikolon de nia vicprezidanto Eleus L. de Sá, krom la sciigon pri la U.K. en Rejkjaviko (Islando), de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1977, ankaŭ li sciigas pri la XII-a Seminario de Esperanto okazonta en Santos (SP), de la 14-a ĝis la 17-a de julio venonta.

1) - BRAZILIO (FD) — "A Candeia", organo de FREL daŭrigas sian efikan laboron por Esperanto, krom siaj artikoloj pri spiritismo. Ĉi numero aperigas elstaran artikolon de S-ro Modesto Belmonte de Abreu, vicprezidanto de BKE, publikigitan en la gazeto "Traço de União", el Pôrto Alegre (RS), sub la titolo "Esperanto em Marcha", kiu pritraktas la viziton de nia prezidanto generalo Ernesto Geisel el Japanujo, farante plurajn konsiderojn pri la diplomatio, inter kiuj li substrekis lalingvan problemon kun reliefa distingiĝeco. Tiu vizito alproksimigas nun pli intime la landon de l'Ekestrema Oriento al Brazilo. Ĉar ekzistas forta baro inter ambaŭ: la lingva problemo, li demandas: ĉu brazilanoj lernos la japanan lingvon? Aŭ male, ĉu la japanoj lernos la portugalan? Aŭ finfine, ĉu oni uzos pruntitan lingvon en ĉiuj specaj interŝanĝoj? Li pritraktis la Japanan Instituton pri Esperanto kaj aliajn organizaĵojn rememorante, ke en Brazilo ankaŭ sin trovas Brazila Kooperativo de Esperantistoj, Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto krom aliaj malpli gravaj societoj ekzistantaj en ĉiuj ĉefurboj de la brazilaj ŝtatoj. Estas sufiĉe ke la naciaj instancoj decidu utiligi Esperanton kiel komunikilon kaj la problemo estos solvita.

RIO DE JANEIRO (RJ) — "Jornal do Touring" aperigas tre interesajn informojn pri turismo, kiuj multe helpas la vojaĝantojn.

2) - BRAZILIO (FD) — "Desed 57" organo de la funkciularo de Banko de Brazilo nun fariĝas tre interesa por nia movado ĉar ĝi publikigas informojn rilatajn al Esperanto, kio atentigis la legantaron pri la utileco de la internacia lingvo. Multaj el la funkciuloj de tiu gravega instituto sin direktis al nia prezidanto petante informojn pri la afero, kaj sin enskribis por lerni la lingvon. Cetere la estraro de B.K.E. estas konsistanta el funkciuloj de tiu Banko en kies kadro jam multaj aliaj partoprenas la movadon.

...

SÃO BERNARDO DO CAMPO — Nesta progressista cidade foi iniciado no dia 7 de maio um curso de Esperanto na sede da Juventude Fraterna "João Ramalho", a cargo do jovem Lourenço Rioji Sogabe, com aula inaugural proferida pelo Prof-or Nelson Silveira, vice-presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto.

...

SANTOS (SP) — LA XII-a ESPERANTA SEMINARIO.

La 12-a brazila Seminario de Esperanto okazos en la ĉarma havenurbo Santos, de la 14-a ĝis la 17-a de julio.

Por pli bone propagandi pri Esperanto ni invitas ĉiujn niajn gesamideanojn partopreni ĝin.

Ofte aŭdiĝas plendoj, ke nia movado ne evoluas, ke la homaro scias nenion pri la internacia lingvo, ke la idiomo ne estas instruata en la lernejoj. Sed kial ni plendas? Kiu respondecas pri nia movado kaj ĝia disvastigado? Estas la esperantistaro mem. Se ni deziras, ke la homoj interesiĝu pri Esperanto, ni mem devas zorgi kaj propagandi grandskale nian idealon.

Iom pli da entuziasmo, iom pli da laboro, iom pli da kunlaboro, eĉ iom pli da monhelpo, kaj la rezultado venos certe.

La vicprezidantoj de BKE donu la plej bonan ekzemplon pri la sincera kunlaborado. La plimulto gvidu kursojn, skribu artikolojn por la naciaj gazetoj, ne nur pri Esperanto kiel interkomunikilo, sed ankaŭ pri ĝia monda signifado.

Ekzistas inter ni pesimistoj, kiuj anstataŭ kuraĝe marŝadi antaŭen, retenas nian movadon. Ili volas nur venki la malfacilaĵojn unuope kaj pro ilia malsukceso iĝas nekontentaj kaj ĉesas labori plendante.

Karaj gesamideanoj, prenu ni niajn manojn, iĝu ni pli lertaj kaj laboru ni kune. La venko venos neatendite tutsola kaj baldaŭ!

Ke ni festu la 90-an datrevenon de nia movado. En la tuta mondo la esperantistaro klopodas fari bilancon pri la movado-progreso. Aliĝu ni al tiu mondmanifesto kaj fiere montru ni al la pesimistoj, ke Esperanto vivas kaj progresas.

Nia Seminario en Santos estu la unua paŝo de nia bonvolo kaj klopodo. Aliĝu ni al ĝi amase. Niaj ĉiam laboremaj vicprezidantoj faru grandan propagandon pri tiu evento, kaj la aliĝklotizojn oni sendu al Kultura Kooperativo de Esperantistoj — Rio de Janeiro (RJ) — Av. 13 de Maio, 47 — sobrela, 208—ZC 06 — CEP. 20.000.

Ni kore antaŭdankas la valoran kunlaboradon de nia karaj vicprezidantoj, kiujn ni atendas en Santos, kore kaj amike.

LINGVAJ PRIKOMENTOJ

(Daŭrigo)

Varmigi — varmiĝi — Estas granda diferenco inter ambaŭ vortoj. Se ekz. ni diras "li varmigis sin", ni esprimas tion, ke li mem

propravole kaj intence faris sin varma. Ekz. "li iris al la varma forno kaj tie varmigis sin". Sed se ni diras "li varmiĝis", ni ne rigardas tion, kio aŭ kiu kaŭzis lian varmiĝon. Tamen oni povas diri: varma lano, varma vesto, varma kovrilo kaj ne kiel kelkaj erare opinias, ke oni devas diri: varmiga lano, aŭ varmiga vesto ktp. Bone estas diri: "tiu mantelo revarmigos vin", ĉar temas ankaŭ tie ĉi pri la konservado de la interna varmo kaj ŝirmanta kontraŭ ekstera vetero. Metafore oni uzas: "varma admiranto, varma partiano", metante fervoron, pasion en siaj agoj. "Varma admiranto de Esperanto". Ankaŭ oni diras: "senti malvarmon" aŭ "terurite li ektemis kaj malvarmo trakuris lian dorson". Aŭ "malvarma rezonado" (senemocia).

La verban finaĵon "u" ni uzas por esprimi ordonon, volon deziron. Ekz.: "Venu, haltu, ktp. Ni diru: "Mi volas, ke li venu al mi (volo), "Mi deziras, ke li resaniĝu" (deziro). La frazo: "Mia patrino divenante pri kio mi pensas kaj rompante la silenton regantan en la ĉambro diris: "Pro ĉi tiaj pezaj frazoj kun multaj superfluaĵaj participoj jam multaj miloj da homoj forlasis Esperanton". Diru: "Mia patrino divenis mian personon. Ŝi rompis la silenton, kiu regis en la ĉambro kaj diris: "Pro ... " La radikoj "komisi" kaj komision" havas malsamajn signifojn: "komisii" estas doni al iu persono plenumotan taskon. "Komisiono" estas grupo de personoj, kiuj devas fari iun esploron aŭ taskon.

En ĉiu kvarsilaba vorto estas du akcentoj: unu sur la antaŭlasta silabo (ĉefakcento), la alia sur la unua silabo (flanka akcento). La flanka akcento estas malpli forta ol la ĉefakcento.

Post la prepozicio "tra" oni ne bezonas uzi akuzativon, ĉar "tra" ne montras moviĝon al iu loko, sed en iu loko. La vorto "tra" indikas specialigitan sencon de la vorto "en": "Iri tra la strato" signifas: iri en la strato, sed tiamaniere, ke oni konencas la iron ĉe unu fino de la strato kaj finas ĉe la kontraŭa fino. "Promeni tra la arbaro" signifas, ke oni komencas la promenadon ĉe unu flanko de la arbaro

kaj oni finas ĝin ĉe la kontraŭa flanko. Malĝusta frazo estas: "Ni promenu tra la urbo". Devas esti: "Ni promenu en la urbo". "Tra la urbo" signifas, ke oni komencas la promenadon ĉe unu flanko de la urbo kaj oni finas ĝin ĉe la kontraŭa flanko. "Tra la stratoj rapidas ĉiuj veturiloj". Ankaŭ tie-ĉi malĝusta estas la vorto "tra". Devas esti: "Sur la stratoj rapidas la veturiloj". — Ankaŭ la frazo: "Ĉe placeto la infanoj ludas". Tie-ĉi la ĝusta prepozicio estas ne "ĉe" sed "sur". Do "Sur la placeto la infanoj ludas". "Ĉe placeto" povus signifi, ke la infanoj ludas ne "sur" la placeto sed en iu apuda strato, proksima de la placeto.

Estas ankaŭ malbona la frazo: "Nur ĝenis min la daŭra martelado de iu forĝisto". La vorto "nur" estas en malĝusta loko. Prefere: "Ĝenis min nur la martelado". Ankaŭ jena frazo: "Sed ne nur mi legis en tiu hotelo, mi ankaŭ amuziĝis". Malbona estas la vortordo. Tiu malsana frazo efektive volas diri, ke "ankaŭ" aliaj personoj legis, ne nur mi". Ni diru jene: "Sed mi ne nur legis en tiu hotelo, mi ankaŭ ..." Oni vidas, ke malbona vortordo ŝanĝas la sencon de la frazo.

Malbona uzo de "dum". — "Dum la vintro" — ĉi tie estas du malĝustaj: anstataŭ "dum" oni diru "en" kaj la artikolo superfluas. Oni diru simple: "en vintro".

Penaloras tie ĉi paroli iom pri la artikolo "la" ĉe sezonomoj. Notinde estas ke la tekston "de l' mateno ĝis la vespero" (1888) Zamenhof poste korektis je "de mateno ĝis vespero". Tamen, antaŭ la sezonomoj li uzis la artikolon, kiam ili funkcias kiel subjektoj de ago-signifaj predikatoj: "nun komenciĝis la vintro". La subjekto "la vintro" plus ago-signifa predikato "komenciĝis" nun; jen aperis (ago-signifa predikato) la printempo; venis la vintro ktp. Male, ĉe statverboj (esti, fariĝi ktp) li preterlasas la artikolon: "kaj estis printempo kaj fariĝis somero, kaj estis aŭtuno kaj fariĝis vintro", kiel adjektoj, ili staras ankaŭ sen artikolo: "tiujn fabelojn ni aŭskultas en vintro; en somero ni veturos per diversaj veturiloj. Aliaj malĝus-

taĵoj: uzado de la prepozicio de kaj da: "En ĝi estas listo da vortoj". Devas esti: "En ĝi estas listo de vortoj", ĉar la vorto listo ne mezuras vortojn, same kiel "serio da artikoloj anstataŭ "serio de artikoloj". Sed bone estus diri: "En tiu-ĉi lernolibro estas MARO da eraroj, ĉar la vorto "maro" mezuras la erarojn. Atenton! La ŝtrumpo ne estas vira vesto. Oni diru: "ŝtrumpetoj".

INFORMOJ

SÃO PAULO — Adressaĵo — Ni ricevis komunikon de San-Paŭlo Esperanto - Asocio informante, ke ĝi havas novan adreson: Avenida São João, 1333 - 2º - Conj. 21, esq. Av. Duque de Caxias, sama Poŝtkesto Nº 5888 - 01.000 São Paulo. Ankaŭ oni sciigas pri:

Curso de Extensão Universitária — Na Faculdade de Filosofia, Ciências e Letras de Santo André (SP) foi iniciado a 23 de abril último um curso de extensão universitária, de Esperanto, freqüentado por 175 alunos, que estão entusiasmadíssimos com a nova matéria. As aulas são administradas pela Prof-ra Elvira Fontes, presidente da Associação Paulista de Esperanto e vice-presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto.

Cursos na sede — Às terças-feiras e aos sábados haverá cursos na sede da Associação, das 19 às 20 hs. (terças) e das 15 às 16 hs. (sábados), com início na segunda quinzena de maio.

Excursões — Informou-nos ainda a Associação Paulista de Esperanto que a sua diretoria organizou agradabilíssima excursão à Praia Azul (Americana) no dia 24 de abril último com a participação de esperantistas de São Paulo, São Miguel Paulista e Guarulhos, tendo sido lotados dois ônibus especiais. As inscrições para uma nova excursão já tinham sido abertas, sendo eleita a localidade de Valinhos tendo

como o ponto escolhido pela promoção a Fonte Sônia, aprazível recanto para o passeio.

Exposição de Pintura e Artesanato — De 28 a 29 de maio de 1977 — Sob o patrocínio da mesma Associação Paulista de Esperanto e organizada por D. Graziela Dias Sterque, presidente da "Casa do Poeta de Praia Grande" efetivar-se-á na sede da APE uma exposição de pintura e artesanato dos artistas de Praia Grande, cuja inauguração ocorrerá no dia 28, às 20 horas. Na oportunidade será oferecido um coquetel aos presentes, inaugurando-se concomitantemente a nova sede da Associação.

CAÇAPAVA (SP) — Nia senlaca vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho sendis al ni ĝojigajn sciigojn pri la granda laboro, kiun li faras en la tuta Brazilo. Laŭ lia informo li kontaktas la plej elstarajn samideanojn el la jenaj urboj: Bauru, Sorocaba, Promissão, Indaiatuba, Jundiaí, Itú(SP), Lavras, Uberaba, Belo Horizonte (MG), Barra Mansa, Niterói, Rio de Janeiro (RJ), Pôrto Alegre, Pelotas, Rio Grande, Bagé (RS), Salvador, Muritiba (BA), Brasília (DF), Alto Paraíso, Goiânia, (GO). Fortaleza (CE), kaj ankaŭ en São Paulo — Serra Negra, kaj São Miguel Paulista, kien li sendas eltranĉaĵojn de liaj artikoloj publikigitaj.

Krom la poresperanta propagando li kontaktas deputitojn, ĉu en la ŝtata Asembleo, ĉu en la Federacia, kun la senatanoj aŭ deputitoj, kiel vicprezidanto de nia BKE, al kiuj li sendas ĉiaspecajn informojn por ilin klarigi pri Esperanto kaj pri ĝiaj venkoj en la mondo.

Li informas ankaŭ, ke al multaj el tiuj urboj, kie li havas kunlaborantojn, li vizitis plurfoje plenumente sian taskon.

Li fariĝis "Helpanta ano de BEJO" (Brazilia Esperantista Junulara Organizo).

Jen ekzemplo imitinda de tiuj, kiuj volas progresigi la Esperanto-movadon.

Ni el tuta koro gratulas nian vicprezi-

danton Silva Velho kaj dankas lian eksterordinaran laboron.

MONO RICEVITA

Ni ricevis "por la progreso de BKE" la jenajn sumojn, kiujn ni el tuta koro dankas kaj esperas estu imitataj de aliaj gesamideanoj:

Alberto Lourenço Cr\$ 100,00

Nelson Silveira Cr\$ 500,00

F. S. Almada Cr\$ 200,00

Sumo Cr\$ 800,00

AŬDI STELOJN

(Olavo Bilac)

— Nu (surpriziĝos vi) parolo stela!

Ci frenezigiĝis! Sed mi diros nun:

— Por aŭdi stelojn mi alvenas ĉe la Fenestro ofte sub la nokta brun'.

Kaj longe ni parolas, unu kun

L'alij, sub la baldakeno hela

De Lakta Voj! Kaj, kiam venas sun'.

Mi plore serĉas tra la blu' ĉiela.

Vi diros nun: — Amik' freneza mia,

Pri kio vi parolas kaj afablas?

Kaj kion diras la parol' ilia?

Kaj mi respondos: — Amu por diveni,

Ĉar nur oreloj de amant' kapablas

La stelan voĉon aŭdi kaj kompreni!

El la portugala esperantigis Sylla Chaves.

Kunlaboraĵo sendita de nia vicprezidanto

Nelson Silveira, al kiu ni kore dankas.

OLAVO BILAC (legu Bilak) (1865-1918)

naskiĝis en Rio de Janeiro (RJ). Studis medicinon kaj juron, sed finis nenium el la du kursoj. Tiam, li sin dediĉis al ĵurnalismo, kak aktive partoprenis en la politiko kaj en patriotismaj tutbrazilaj kampanjoj. Tial li estis persekutita kaj arestita de la Marŝalo Floriano Peixoto. En la poemo "Fidkonfeso" li difinis sian parnasanan

kredon, kaj defendis la amon al stilo, al lingvopureco kaj al formkorekteco. Lia nomo mem, Olavo Braz Martins dos Guimarães Bilac, jam entenis perfektan aleksandran version. Li estas konsiderata la plej granda brazila sonetisto. En la unuaj jardekoj de la nuna jarcento li estis la plej legata poeto en la lando, kaj ankoraŭ estas unu el la plej popularaj. Ek de 1922, li estis atinginta de la modernisma reago, sed lia gloro restis neŝancelita, pro la alta kategorio de liaj poemoj kaj ilia daŭra sorĉo sur la publikon. Li estis fondinta membro de la Brazila Beletra Akademio. Ĉefaj poeziaj verboj: "Lakta Vojo" (sonetoj), "La Smeraldoĉasisto" (epopeo) kaj "Vespero" (diversspecaj poemoj).

FRAŬLINO ESPERANTO 77

La societo BEJO — Brazila Esperanta Organizo, kiu kreskas kontentige en nia lando, sendis al ni sian statuton, kaj interesan programon rilatan al institucio de konkurso por elekti la "Fraŭlinon Bejo 77" okaze de la XII - a Seminario de Esperanto, kiu estas programita por la monato julio venonta, de la 14 - a ĝis la 17 - a.

Oni jam komencis labori por tiu evento en Rio de Janeiro, São Paulo, Goiânia, kaj Brasília, kie pluraj fraŭlinoj disvendas voĉojn je Cr\$ 1,00. Oni ankaŭ pritraktas la pligrandigon de la anarox tiele: "ANOJ POR BEJO" — Junulo ĝis 30 jaroj: — Simpla membro pagas Cr\$ 40,00; Membro subtenanto, Cr\$ 50,00. Personoj pli ol 30 jaroj: Helpanto pagas Cr\$ 50,00 kaj Protektanto, Cr\$ 100,00 (aŭ pli).

MUZIKFESTIVALO

Laŭ informo de nia samideano André Luiz Fausto de Souza, presidanto de la Kultura Departamento de la sama organizo BEJO, en la kadro de la XII — a Seminario okazos la "Unua Esperanta Muzik-festo" kun la jena Programo:

REGULARO

- 1 — La muzikoj (melodioj) kaj la vortoj devas esti tute novaj, nekonataj, neniam vidataj antaŭe;

- 2 — La aŭtoto aŭ reprezentanto devas partopreni la XII - an Seminarion;
- 3 — Ĉiu regiono povas kunpolti 3 muzikojn;
- 4 — Ĉiu kantisto aŭ kantistino estos elektita de la kandidatoj, eĉ pri ilia partopreno en la Seminario.

ALJUĜADO

- 1 -- La juĝantaro havos 10 elementojn, kies nomojn oni diskonigos en la tago de la konkurso.
- 2 -- La muzikoj estos juĝataj laŭ la melodio, vorto, prezentado kaj interpretado, (la du lastaj kondiĉoj estos unuiĝitaj).
- 3 -- Pri la decido de la juĝantaro ne estos apelacio, sed se temos pri egalligo, koncernos al prezidanto de la juĝantaro doni la voĉon de Minerva.
- 4 -- Estos premio ekstra aljuĝota al tiu, kiu havos la plej bonan prononcon de Esperanto, inter la muzikoj prezentitaj, ĉu klasigita aŭ ne
- 5 -- Estos malpermesate komunikoj de ia ajn kategorio al juĝantaro dum la konkurso.

PREMIOJ

- 1 -- Estos premioj ĉu per mono, ĉu per trofeo, estante la trofeo de la unua loko ĉe la unua gajninto dum 3 jaroj aŭ trifoje.
- 2 -- La premioj estos liveritaj tuj post kiam oni decidis pri la gajnintoj.
- 3 -- Tri muzikoj estos elektitaj aŭ klasigitaj (resp. 1-a, 2-a kaj 3-a lokoj).
- 4 -- En okazo de egaligo, oni adoptos la voĉon de Minerva.
- 5 -- La valoro de la premioj estos konataj oportune.

ENSKRIBOJ

- 1 — La enskribo estas faratajen la societoj pli proksimaj.
- 2 — Ĉe la enskribo la kandidato devas pagi la kotizon je Cr\$ 15,00 por ĉiu muziko.
- 3 — La konkuranto devas esti ano de BEJO.
- 4 — Oni postulas 12 kopiojn de la muziko prezentota kaj ĝiaj vortoj.
- 5 — Ankaŭ oni postulas unu kopion de la partituro (muziko) aŭ gravuraĵon sur "cassete".